

ENKONDUKO

Karaj OVO-legantoj ,

Jam de longe sentiĝas la manko de revuo kiu estos alloga legaĵo por komencantoj (ĉefe junularo) kaj enhave kaj laŭ la lingva facileco. Enketa esploro farita antaŭ du jaroj montris ke jare oni instruas komencan nivelon de Esperanto al inter 50 kaj 100 mil gelernantoj (ne kalkulante Ĉinion kaj Brazilon). Ĉirkaŭ 80% el ili estas gejunuloj! Jen kial ni lanĉis OVO-n. Ĝi servu al multaj kiuj deziras facilan kaj amuzan periodaĵon. Tamen, ĝi estu ankaŭ instrua kaj eĉ satira. La Esperanto-movado havas multajn amuzajn kaj kritikindajn aspektojn. Ĉu ne estas tempo ke oni kovu OVO-n kun pikiletoj? Eble ne kun tro akraj pikiloj, sed tamen! Multaj legantoj verŝajne deziras ekscii interesajn el la vasta nekonata mondo, kiuj estas nek anoncoj pri militoj, nek pri ekonomiaj krizoj, nek pri organizaj aferoj de la Esperanto-movado. Jen loko por tio. Ni aperigos artikoletojn pri strangaĵoj, nekonataĵoj kaj interesaj saĵoj en la rubriko „Bunta Terglobo”, sed ankaŭ pli seriozajn analizojn de interesaj fenomenoj en formo de pli ampleksaj artikoloj. Ni zorgos pri bildstrioj, romano en daŭrigoj, rakontoj, rebusoj, ŝercoj ktp. Ni volas informi niajn legantojn pri konvenaj vojaĝeblecoj – esperantistoj ja estas vojaĝema popolo – kaj ni volas stimuli internacian reciprokan helpadon inter la legantaro. Jen la skeleto de niaj intencoj. Kaj ni esperas ke tia koncepto de la revuo estos bone akceptita ĉe la legantoj. La realigo kaj sukcesa estonto dependas ne nur de nia redakcio, sed grandparte de vi, karaj gelegantoj, kies kontribuojn ni petas por ĉiuj rubrikoj, samkiel ni atendas viajn sugestojn por plibonigo de la gazeto. Kunlaboru, abonu kaj abonigu. Aparte gravas kolektivaj abonoj de instruistoj por siaj E-klasoj. Ne forgesu: je dek abonoj - unu senpaga! Se ni kolektos pli ol 2000 abonantoj, OVO povos eble eĉ plioftigi sian aperritmon kaj fariĝi la plej ofta revuo en Esperanto. Ĉu vi subtenos tiun deziron? Ni antaŭdankas pro via konfido. Ne juĝu nin nur laŭ tiu ĉi numero, la veran fizionomion vi ekkonos post kelkaj numeroj. Tiun ĉi ekzempleron vi ricevas senpage, sed la postajn ne plu!

Pli valoras tuj ovo, ol poste bovo.^z

PLEDO POR LA SOCIOLOGIO DE

FUMADO

Post manĝado, trinkado kaj memmultobligado certe la plej amasa aktiveco estas fumado. Sed, male al la ceteraj kiuj ne dividas la homaron je tiuj kiuj manĝas kaj tiuj kiuj ne manĝas, trinkas kaj ne trinkas, fumado estas bazo de grava socia disduiĝo de la homa socio je du grandaj sociaj grupoj: **fumantoj kaj nefumantoj**. Tiu disduiĝo estas pli ĝenerala eĉ ol — la tiom emfazata — klasa distavoliĝo, kaj la psiksocia strukturo de tiuj grupoj estas tiom diversa kaj konflikta ke la klasoj devas resti en ĝia ombro. Tio instigas min formuli 'revolucion' teorion laŭ kiu la socion oni dividas nur en tiujn du bazajn grupojn. La avantaĝoj de tiu teorio estas evidentaj: ĝi estas **simpla, tutkovra kaj nekontraŭdira** kio estas la tri logikaj principoj por valideco de teorio.

Komence ni starigu kelkajn ĝeneralajn tezojn de la nova sciencobranĉo: sociologio de fumado.

1. La esenco de fumado estas **konflikto**. Se ne ekzistus forta malaprobo de fumado flanke de la nefumantoj, la fumantoj mem ne ekzistus kiel aparta grupo (nek la nefumantoj).
2. Tio estas ĉefa kialo de alta ŝtupo de integriteco de la fumanta grupo. Tiu grupo estas pli firma, pli sociigema kaj solidara. Sekve: la nefumantoj estus malstabilaj personoj, malicaj laŭnature kaj malsociigemaj.
3. La nefumantoj tamen estas pli viglaj kaj aktivaj (altrudemaj) en defendado de siaj starpunktoj. Ili ĉiam krias kontraŭ la fumado dum la fumantoj modeste, senbrue faras sian laboron. Sekve evidentas ke la nefumantoj estas ekzaltitaj personoj kiuj ĉiam volas esti en la centro de atento. Krome, dum ili nervozigas pro la fumado, la fumantoj kviete fumas, kio nuligas la ĝenerale akceptitan antaŭjuĝon ke la fumantoj estas feblonervaj personoj. Kaj ĝuste la nefumantoj ja estas nervozuloj! Estas eble fina momento por ili komenci fumi!
4. Alia antaŭjuĝo estas ke fumado estas speco de dependiga malsano kiel narkotismo aŭ alkoholismo. Tamen, ĉesigo de fumado ne provokas tiajn fiziologiajn problemojn kiel la narkotikoj aŭ alkoholo. La fumado estas simpla socia bezono. Tio estas baza fondotezo de la sociologio de fumado.
5. Jes ja. La fumado detruas la sanon, ĝi estas korpodanĝera. Cetere, la plej grandaj zorgantoj pri la sano de la fumantoj estas ĝuste la nefumantoj, kio estas pura demagogio. La fumantoj al sia vivo rilatas senzorge kaj liberece, eĉ iom cinike kaj optimisme. Ili tiel starigas sin super la naturaj leĝoj kaj akiras (eble falsan) sencon de persona (homa) libereco. La nefumantoj, dume, estas raciistoj kaj aviduloj, ili avaras pri ĉiu tago de sia vivo, ili estas por striktaj vivreguloj, kio indikas pri la nedemokrata strukturo de la nefumanta personeco.

Tiuj ĉi tezoj eble provokos aliajn sociologojn kaj psikologojn pli profunde pripensi la problemaron kaj kontribui al la fondo de la nova multidisciplina scienca teorio pri fumado.



Foto: Ivica Špoljarec

Antaŭ persona kontaktiĝo kaj konatiĝo kun la jugoslava poeto **MLADEN DRAJĴETIN** — iniciatinto, organizanto kaj realiganto de la „korespondanta teatro“, mi sciis kaj konsciis pri la fakto ke ekzistas „korespondaj kursoj“, „korespondaj lernejoj“, „korespondaj studoj“, „korespondaj konsultoj“ kaj ... kaj „korespondanta ŝakludo“. Sed pri „korespondanta teatro“!? Ne, tion mi neniam aŭdis, tion mi ne povis eĉ imagi...

— Ĉu eblas „korespondanta teatro“? — kun nekredemo mi demandas Mladen Drajetin.

— Ĝi eblas, kompreneble! — li respondas simple. — Kial ĝi ne eblas? — sekvas lia kontraŭdemando kaj dume li daŭre ridetas.

Mi estas senvorta. „Korespondanta teatro“, kiel dirite, eĉ imagi mi ne povas. Ĉiu teatro — profesia aŭ amatora, tutegale — bezonas scenejon, geaktorajn, reĝisoron, kulisojn, kostumojn... Kiel ĉion ĉi organizi kaj funkciigi „koresponde“!?

ASPIRO: TOTALA TEATRO

— Nia teatro ne estas „klasika teatro“ — klarigas al mi Mladen Drajetin. — Nia teatro ekestis, naskiĝis ĝuste „pro manko de spaco“ necesa por normala aktivado de amatora teatra grupo laŭ la kutima kaj klasika maniero. Multaj homoj ŝatas teatran arton. Multaj homoj deziras aktivigi kaj aktivadi en iu amatora teatra grupo, sed malmultaj — bedaŭrinde, kompreneble! — sukcesas efektiviĝi sian deziron. Tio instigas min eltrovi ian novan modelon kaj formon de amatora teatro — en kiu povos aktivigi kaj aktivadi ĉiuj interesuloj, sendepende de iliaj loglokoj, de ilia labor-tempo ... ktp.

La membriĝo al tiu ĉi tetra grupo estas tre simpla. Sufiĉas en skriba formo esprimi sian deziron al la adreso: Pozornica dramske umetnosti, poŝtfako 360, YU-21001 Novi Sad, Jugoslavio. Ĉiu anoncinta kaj membriĝinta aktoro responde ricevas „komencan koncepton de la dramo“, kies scenejigo estas preparata, samtiel ankaŭ ĉiujn necesajn skribajn informojn, kaj post tio la estonta aktor(in)o — memstare aŭ kunlabore kun la reĝisoro — komencas prepari (verki!) la tekston de la rolo elektita aŭ ricevita.

— La aktoro en nia teatro ne estas nura aktoro — akcentas kaj atentigas Mladen Drajetin. — Ĉiu aktoro estas samtempe ankaŭ aktiva „verkisto“ de la dramo, li aŭ ŝi estas — unu el la kunaŭtoroj!

— Sed tio signifas ke malofte okazas ke iu el viaj surscenigitaj dramoj estas prezentata al la publiko en du identaj variantoj?

— Ĝuste! Vi pravas... Tion mi iom pli detale klarigos al vi per unu

KORESPONDA TEATRO- - KIAL NE ?

En la jugoslavia urbo Novi Sad, sen ia ajn imitebla ekzemplo aŭ modelo, ekfunkciis kaj funkcias tute nova, nekutima kaj neordinara (unika en la mondo, oni povas diri!) tipo de teatro – KORESPONDA TEATRO!

Esperantistoj el la tuta mondo, amatoraj kaj profesiaj geaktoroj kaj ĉiuj aliaj aktivemuloj en la teatra arto, estas invitataj al aktiva kunlaborado... Sufiĉas skribi tiusenkan leteron kaj sendi ĝin al la adreso: POZORNICA DRAMSKE UMETNOSTI, poŝtfako 360, YU-21001 Novi Sad, Jugoslavio...

ekzemplo. Mi mem verkis la dramon „Konfeso”, kiu estas la plej ŝatata prezentaĵo de nia teatra grupo, sed mi mem ne estas la sola, la nura aŭtoro! Mi estas nur unu el la kunaŭtoroj... ĉar mi nur iniciatis ĝin.

La de mi verkitan tekston mi trovas nur „komenca koncepto de la dramo”. En rekta kunlaborado inter la aŭtoro, reĝisoro kaj geaktoroj... la verko fariĝas „komuna verko”, ĝi estiĝas verko kaj kreaĵo de ĉiuj aktivaj kunlaborantoj en la realigado de la dramo.

Pri la dramo „Konfeso”, kies iniciatinta aŭtoro estas Mladen Draĵetin, oni povas diri ke ĝi ne estas nura dramo sed samtempe ankaŭ – nov-tipa teatro. Ĉiu prezentaĵo de tiu dramo estas unufoja, neripetebla. Post la unua prezentaĵo, en iu urbo aŭ vilaĝo, ĝi estas prezentata duafoje kiel komuna verko de la aŭtoro, reĝisoro, geaktoroj kaj de la publiko! Post la unua prezentaĵo oni enketas la publi-

La prezentaĵoj de „koresponda teatro” estas neripeteblaj

kon – per enketiloj la publiko esprimas sian opinion pri la dramo, pri la prezentaĵo... La prezentintoj detale analizas ĉiujn sugestojn, kaj venontsemajne la sama dramo, en ŝanĝita formo – laŭ la deziroj kaj esprimitaj gustoj de la spektintoj, post analizo de la enketiloj, estas prezentata al la sama publiko en tute nova formo.

La elstara jugoslava teatra reĝisoro Milenko Ŝuvakoviĉ partoprenis unu el la prezentaĵoj de la „koresponda teatro”, kiu ravis lin:

– En la vilaĝo Bukovac mi havis la okazon, la feliĉon – oni rajtas diri, spekti la prezentaĵon de la dramo „Konfeso”, kiun prezentis amatora teatra grupo konsistanta el proksimume tridek geaktoroj. Bonega kaj neforgesebla prezentaĵo kaj travivaĵo! Tiuj du horoj forflugis kiel iu bela vivmomento. En la personeco de juna virino Beba mi vidis kaj spertis ĉion kio la vivon faras „vivo” – mi vidis ĉion pasintan, ĉion pasontan... kaj tion kio eterne daŭros. Mi ploris kaj ridis samtempe. Tiu prezentaĵo estis komuna ludo de la geaktoroj kaj de la publiko. La tutan mian vivon mi atendis por vidi tian dramon – estis komento de la reĝisoro Ŝuvakoviĉ.

La „koresponda teatro” POZORNICA DRAMSKE UMETNOSTI meritas, do, la nomon – „totala teatro”! La prezentaĵon kreas ĉiuj – la aŭtoro, la reĝisoro, la geaktoroj, la publiko... ĝi estas kreata en iu ajn urbo, en iu ajn vilaĝo, surstrate, en iu ajn fabriko... – Ni aspiras atingi naturecon kaj simplecon, kiaj ekzistas inter la homoj – klarigas Mladen Draĵetin.

ŜANCO POR ĈIUJ TEATREMULOJ

La „koresponda teatro”, iniciatita de Mladen Draĵetin, ekfunkciis



MLADEN DRAĴETIN – inicianto de „koresponda teatro”

antaŭ dek jaroj – en la jaro 1974. Ĝis nun en tiu teatra grupo aktivis pli ol 300 amatoraj geaktoroj en proksimume 100 prezentaĵoj en diversaj lokoj en Jugoslavio. Aktivis geaktoroj en la aĝo inter 16 kaj 50 jaroj, el diversaj originaj profesioj – lernantoj, studentoj, laboristoj, fakultate edukitaj kaj profesiaj geaktoroj.

– Kaj kiel plue? Kion vi intencas aŭ pretendas en la estonteco?

– Ni havas multajn novajn ideojn, niaj pretendoj estas sufiĉe grandaj – diras al mi Mladen Draĵetin. – Bedaŭrinde, mankas la necesa mono por realigi ĉiujn niajn ideojn. Tamen, ni estas kontentaj ankaŭ kun tio ĉi kion ni ĝis nun atingis. Ni invitas ĉiujn dramverkistojn al kunlaboro, ni surscenigos iliajn tekstojn. Ni invitas ĉiujn homojn kiuj volas aktori! Ni invitas ĉiujn teatremulojn – scenografistojn, ŝminkistojn, frizistojn... ktp. kunlabori en nia teatra grupo. Ili helpos al nia grupo, ili realigos siajn specifajn inklinojn al teatra arto...

Aparte ni invitas ĉiujn esperantistojn, el la tuta mondo, partopreni aktive en nia teatra grupo. Imagu nur „internacian korespondan teatron”!?

Multaj opinias ke la „koresponda teatro” POZORNICA DRAMSKE UMETNOSTI estas – vera teatro. Ĝi estas, laŭ diversaj opinioj, teatro kiu estontece grave evoluigos kaj populariĝos, ĉar ĉiu povas kompreni ĝin, ĉar ĉiu povas, laŭ siaj personaj kapabloj, partopreni en ĝi.

Ĉu „koresponda teatro” ne estas ŝanco ankaŭ por la esperantistaro? Ĉu vi ne ŝatus partopreni en „internacia esperantlingva koresponda teatro”!?? Ŝanco ekzistas, kion vi ankoraŭ atendas? Anonciĝu, kunlaboru...





DAMIR MIKULIČIĆ estas ĵurnalisto kaj unu el la plej konataj verkistoj en scienc-fikcia literaturo de Jugoslavio. Li aperigas rakontojn de tiu ĝenro en pluraj jugoslaviaj revuoj. En 1983 aperis libroforme la scienc-fikcia rakontokolekto „O” kroatlingve.

En Esperanto li verkis poemojn kaj tradukis ĉefe poezion. Mikuluĉiĉ estas ĉefredaktoro de Esperanto revuo „Homo kaj Kosmo” kaj longjare parolisto en Esperanto-elsendo de Radio-Zagreb.

Ni prezentas al vi lian scienc-fikian rakonton „Prokionaj ĉerizoj”.

PROKIONAJ ĈERIZOJ

La 21-an de aprilo 2282

Morgaŭ mi havos dekdu jarojn. La patrino, ŝi jam diris, faros torton kiun mi ŝategas. Tiun, kiun ni manĝis ankaŭ pasintjare, tiun el prokionaj ĉerizoj. Ni ĉiuj sidiĝos ĉirkaŭtable, kaj la torto lumos, la ĉerizoj brulos en ĝi per ĉiuj ĉielarkaj koloroj, kiel nur la prokionaj ĉerizoj brulas. Mi ŝatas tiujn kolorojn. Ili estas kiel artfajraĵo kiam ĉe ni gastis amikoj de la patro, venintaj el Siriuŝo. Jolo tiam elprenis siajn dresitajn kolorojn kaj ili ĉirkaŭdancis nin, iliaj sennombraj fadenoj kuregis el la ejo volante ĉirkaŭi nin, kaj ni kuradis apude, fuĝante de antaŭ ili. Tio, nome, estas saĝaj fadenoj, dresitaj samkiel ankaŭ mia hundo Garo. Estis gaje, sed plej ĝojige, kompreneble, estis al Jolo. Ĝia pilkorpo nur saltetadis, tial la koloroj ne povis kapti ĝin. Verŝajne ĝi tiel dresis ilin, por esti pli rapida ol ili. Min ĉirkaŭis la verda, kaj ne volis ellasi min. Ĝi ĉirkaŭis mian tutan korpon, tuŝante min, mi kriis pro feliĉo, sed mi tamen volis forkuri de antaŭ ĝi, mi volis rigardi ĉiujn, ne nur unu el ili. La verdaj fadenoj fine tiel malliberigis min ke mi vidis ĉion ĉirkaŭ mi verda. Kiam oni eldormigis min, mi unue ekvidis la patron, li ridetis kaj diris: „Tio estas nenio, malsaĝulino mia, ne timu, tio estas nur ĝojiga siriusa ludo kun vivaj koloroj. Ili nur ŝercas pri vi.”

Mi nun rememoris pri Jolo de Siriuŝo kaj

pri ĝiaj malsaĝaj koloroj, sed fakte mi volis ion surpaperigi pri prokionaj ĉerizoj. Miaj pensoj ĉiam kuras ien dum mi taglibrumas. Same kiam mi skribas pri ĉeriz-torto. Pri mia naskiĝtaga torto. La patrino promesis fari ĝin, ĉar ŝi scias kiom mi ŝatas la kolorojn. Ŝi scias ankaŭ pri mia talento, kiun al mi jam eksplikis kaj klarigis plenaĝuloj. Mi, nome, manĝante prokionajn ĉerizojn, sentas ilin ne nur guste, kiel ilin sentas la aliaj, sed ankaŭ kolore. Fakte, mi tion unue diris al la patrino, poste ankaŭ al la patro, ĉar ili tion ne povis scii alimaniere. Mi diris al ili ke enbuŝe mi sentas kolorojn, kiuj, kiam mi ekmanĝas prokionan ĉerizon, disiras en mi, plenigante min per koloroj kvazaŭ radioj de artfajraĵo.

Mia patro tion poste rakontis al siaj amikoj de Prokiono, kaj ili foje estis ĉe ni, kaj longe min pririgardis, manĝigante min per ĉerizo post ĉerizo, mezurante dume min per iu sia aparato, kaj ili interparolis en la prokiona lingvo, kiun tiam mi absolute ne konis. Nun mi jam sufiĉe konas ĝin, sed ne tiel bone kiel Elza, ŝi jam tri fojojn estis sur Prokiono. Ĉiufoje kiam oni min tiel pridemandis, mi tiom satmanĝis tiujn ĉerizojn, ke mi ekdormis ĉirkaŭita per koloroj kiuj elradiis el mia buŝo, nazo, okuloj, kaj mi diris poste al la prokionanoj ke mi bonege fartas. Al mi speciale plaĉas tiuj la plej maturaj, sukaj, dikaj. Kiam mi ilin manĝas, en mi disiras ĉiukoloraj riveroj, kaj

mi vojaĝas sur ili de unu al la alia, kaj poste ĉio trankviliĝas, la koloroj iom post iom malaperas fariĝante odorplena aero kiun mi ankoraŭ longe sentas en mi.

Morgaŭ, do, mi havos dekdu jarojn. Sed, ne tio estas la plej grava. La plej grava estas tio, kio okazos postmorgaŭ. Postmorgaŭ mi vojaĝos al Prokiono. Ho, kiel ĝoja mi estas. Tio estas la unua fojo ke la patro min kunprenos al Prokiono. Por la naskiĝtago, donace, diris li. Sed la patrino malsekretigis ke ni ne veturos nur pro la naskiĝtago, sed pro tio ĉar prokionanoj petis la patron, ke mi gastu ĉe ili. Ili deziras pridemandi min per ankoraŭ kelkaj aparatoj kiujn ili ne povas porti al Tero. Eĉ pli, mi estas ilia gasto pro la ĉerizoj kaj pro mia talento. Kaj la patrino kromdiris al mi ke mi nenion pri tio diru al la patro, ĉar li deziras ke mi tion ne sciu, sed mia talentego ege interesas la prokionanojn. Tie ĉiuj rakontas pri la speciala okazaĵo, pri unu malgranda ter-knabino kiu la nura, el ĉiuj teranoj kapablas senti tion, kion sentas nur la prokionanoj. Pri tio okazis antaŭnelonge diskutego dum kunveno de Rigo, la pleja sciencista kunsido de la prokionanoj. La patrino plusdiris ke mi estas talento kiu nun nuligas iujn teoriojn rilate al

evolucio pri malsamaj vivoformoj en la kosmo. Ŝi kromparolis ankaŭ pri galaksi-mutacioj, panspermio kaj simile, kion mi malmulte komprenis, kaj ŝi klarigis al mi ke tio estas gravegaj aferoj kiujn mi komprenos kiam mi ankoraŭ iomete kreskos.

Sed, mi tute ne interesiĝis pri tio. Gravas nur ke mi veturos. Al Prokiono. Mi estas tre feliĉa, mi apenaŭ atendas la postmorgaŭon. Nur tiu ĉi nokto, la morgaŭo, plus unu dormo, kaj, kiam ni vekigos, ni ekveturos. La patro kaj mi. Per prokiona hiperkosma ŝipo, ne per la nia. Ili venos kunporti nin, ni estas iliaj gastoj, mi estas ilia gasto.

Ho, kiel mi tie satmanĝos tiujn ĉerizojn.

La 7-an de majo 2282

Pasis dekkvintago de post tiu sunleviĝo kiam ni ekiris de sur Tero, kaj post dekokhora vojaĝado ni atingis Prokionon. Dum tiu dekkvintago mi nenion skribis en mian taglibron. Mi estis malsana. Mi ne havis forton por io ajn post ĉio kion mi tie travivis. Nun mi jam fartas pli bone kaj unuafoje oni lasis min sola dum mallonga tempo. Ĝis nun ĉiam estis iu kun mi, plejofte la paĉjo aŭ panjo, kiun oni ankaŭ tuj venigis, aŭ iu el la amikinoj. Mi estis malĝojega. Mi pluaŭdas la muzikadon kiun mi aŭdis en la strato de ĉerizarboj kien irigis min iun tagon la prokionanoj.

Fakte tio ne estas veraj arboj kiel la niaj sur Tero. Laŭ mia opinio ili pli similas iajn spongegojn. La ĉerizoj estis jam surtable, kaj mi aŭdis muzikon kiun krom mi neniu aŭdis. Ĝin eĉ prokionanoj ne aŭdis. Ili tion diris poste. Mi ploregis. Tiu muziko estis kvazaŭ plorkanto, la arboj kvazaŭ plorus pri siaj ĉerizoj, mi aŭdis ilin, kaj tuj vortis tion al la patro. Ili pensis ke mi ŝercas, sed mi ekkuris al la plej proksima arbo kaj ĉirkaŭprenis ĝin. Mi ne havis eĉ forteton por forlasi ĝin, por iam ajn deĝi de ĝi, mi memoras ke oni min perforte detiris, kio min dolorigis kvazaŭ oni ŝirus pecon de mi, tio terure dolorigis, mi kriis prodolore, kaj mense mi nur ripetadis: „Lasu min ĉi tie por ĉiam, mi estas ilia, mi estas ilia frukto.” Mi prodolore svenis kaj vekigis en kuŝejo. Ĉiuj min apudis. Mi sentis malĝojon, mia tuta korpo min doloris, mi parolis al ili ke mi deziras reveni al la arboj kiuj min bezonas, kiuj ploras pri mi kaj pri siaj ĉerizoj. Poste venis prokionaj doktoroj kaj ili longe demandadis min, kaj metadis iujn instrumentojn sur mian kapon, kaj poste mi iom-post-iom trankviliĝis, min jam nenio doloris, mi nur petadis ke oni redonu al ili la ĉerizojn.

Nun mi jam bone fartas. Ni revenis al Tero, mi resaniĝis. Sed, neniam mi forgesos la malesperon de tiuj arboj. Mi estis la unua vivulo kiu ilin aŭdis kaj komprenis.

Tial neniam, neniam plu mi manĝos la prokionajn ĉerizojn. Mi ja ne estas kanibalo.

Esperantigis J. Zarkoviĉ





ĜEKNABOJ, VENU!
KIKO FAROS TEATRAJON
KUN GLACIAĴO.

GLACIAĴO
KOSTAS KVIN
DINAROJN
KAJ ĈE VI
NUR DU!

ESTAS JA SKRIBITE,
LA GLACIAĴO ESTAS
SENPAĜA.

HODIAU
KIKO-TEATRO
"DOLĈA VIVO"
KOMEDIO
ENIRO: 2 DINAROJN
SENPAĜA
GLACIAĴO
POR ĈIUJ
RIGARDANTOJ



SED KOMENCE ONI DEVAS
ATENĜI KE IU NE TRO
MANGU KAJ ALIAJ RICEVU
NENION.



TIAL ĈIUJ AKCEPTIS LA DIRON
DE LA MUSKETISTOJ: „ĈIUJ POR
UNU, UNU POR ĈIUJ!”
POSTE ĈIUJ ESTIS FELIĈAJ
KAJ KUNE MANGIS GLACIAĴON.



ĈU ANKAŬ VI KONSENTAS
KAJ UNUECAS?

JES, JES! ĈIUJ POR UNU
UNU POR
ĈIUJ!



LA TEATRAĴO FINIĜIS,
ESTIS MALLONGA, SED
DOLĈA. NUN NI
MANGU LA GLACIAĴON.



KIEL MI PROMESIS,
JEN VIA
SENPAGA
GLACIAĴO.

KIO?
UNU POR
ĈIUJ?

KAJ VI PRE-
NIS MONON
POR DEK
GLACIAĴOJ...



...KAJ PAROLAĈIS
MALSAGAĴOJN.

TIEL ONIJA FARAS.
ANKAŬ LA PLEN-
KRESKULOJ
KAPTIĜAS AL
TIU TRUKO.



Zsoltany

JOHÁN VALANO

ILI KAPTIS ELZAN!

TELEFONA VOKO

„La polico kaptis Paŭlon kaj Sofian,” la viro diris en la telefonon.

„Kion?” sonis responde la malproksima voĉo, nekrede.

„La polico kaptis Paŭlon kaj Sofian,” la viro rediris. „La kunveno antaŭvidita por morgaŭ vespere ne povos okazi. Sciigu al Karlo, li scios, al kiu transdoni la informon.”

„Diable! Mi tion faros tuj. Kion pli?”

„Nenion. Atendu, ĝis mi rekontaktos vin. Ĝis!”

„Ĝis!”

La viro eliris el la trinkejo, kie li telefonis, kaj malaperis en la nokton. Alta fortulo, kies vestoj aŭ agmaniero neniel konigis liajn policajn funkciojn, diskrete ekpaŝis malantaŭ li. Li ridetis. Li sentis, ke vere komenciĝas la fino de tiu Movado por Vera Eŭropo, kiu respondecis pri tiom da mortoj, ekde la unua bombo en la flughaveno ĝis la hieraŭa ĉe la sinagogo de strato Kaloĉaja.

Bedaŭrinde nur, ke li ne povis scii, al kiu la viro kiun oni sekvis ĵus telefonis.

ĈU EDZIĜI?

„La problemo pri vi, Adriano, estas, ke vi neniam edziĝis.”

Adriano Pipelbom malkontentis. Ekde kiam lia fratino Galina elparolis tiujn vortojn, la antaŭan vesperon, ili turniĝis kaj turniĝis en lia kapo, kaj ne lasis al li minuteton da paco.

Kial do la diroj de lia fratino tiel forte efikis al li? Li estis 50-jara nun, li estis riĉa, li ŝategis la potencon, kiun mono havigas. Kial do li, Adriano Pipelbom, unu el la plej sukcesaj industriistoj en la lando, lasis sian 58-jaran fratinton paroli al li, kvazaŭ al knabeto? De kie venis la nekredibla aŭtoritato, kiun Galina havis super li?

Malbonhumore li veturis nun direkte al la malsanulejo, kaj la silento de lia ŝoforo ne helpis lin gajiĝi.

„La problemo pri vi, Adriano, estas, ke vi neniam edziĝis.”

Li eligis profundan elspiron.

Povus ŝajni strange, ke la fama Pipelbom, ĉefo de granda industrio, unu el la plej riĉaj kaj potencaj homoj en la lando, ĝenerale sentis sin antaŭ virinoj kiel infaneto, almenaŭ se temis pri io pli intima ol diskutoj rilataj al la ekonomia aŭ politika situacio. Sed tiel estas.

Personaj rilatoj kun virino estis por li timigaj. Li ĉiam diris al si, ke li estas unu el tiuj homoj, kiuj travivas nur unufoje en la vivo veran parnan amon. Tian amon li havis, kiam li estis dekkvinjara. Sed la knabino, kiu estis la valorea objekto de liaj amaj sentoj, forlasis lin, edziniĝis, kaj malaperis el lia vivo. Eble li ne-

niam resaniĝis de la doloro, kiun ŝi tiel kaŭzis. Eble pro tio li neniam plu intimiĝis kun virino.

Kaj nun, lia fratino Galina revekis en li malnovajn dezirojn, kiujn li opiniis mortaj. Ĉu ne estas malsaĝe malhavi dum la tuta vivo la dolĉan proksimecon de amema belulino? Ĉu eblas, ke dum tiuj longaj jaroj da soleco, li fakte — sed senkonscie — deziris ion alian?

„Ludoviko, ĉu via opinio mi devus edziĝi?” li demandis la ŝoforon.

Ĉe alia veturigisto tia demando eble estigus salteton de ekmiro, sed ne ĉe Ludoviko. La ŝoforo de s-ro Pipelbom sekvis sian vivovojojn simile al la Rolls-Royce, kiun li nun irigis: trankvile, facile, digne, kvazaŭ malhelpoj kaj ĝenoj ne povus ekzisti.

Kun eta-eta rideto li respondis:

„Estus ekster mia rolo doni al vi konsilojn, sinjoro.”

„Jes, jes. Komprenoble. Mi devus scii, ke vi trovos belan vortigon por digne elturni vin el la demando. Sed diru al mi, kion vi opinius, se mi informus vin, ke jen mi baldaŭ edziĝos?”

„Se vi permesas al mi respondi malkaŝe, sinjoro, mi dirus, ke mia reago dependus de la sinjorino, kiu havus la feliĉon kunigi sian vivon al la via.”

Dum longa minuto, Pipelbom restis silenta.

„Mia fratino Galina ŝatus, ke mi edziĝu,” li diris.

Ludoviko plu ŝoforis senvorte.

„Ĉu vi aŭdis min? Kion vi opinias pri la ideo de Galina?”

„Ne estas mia rolo preparoli la anojn de via familio, sinjoro, sed tamen, ĉar vi esprimis la deziron koni mian penson, mi vortigos ĝin jene: la vivo montris, ke s-ino Galina ĝenerale estas prava en siaj decidoj. Ŝi estas nepre kredinda persono.”

„Guste. Ŝi ĉiam estas prava. Tial mi ne mirus, se ankaŭ ĉi-foje ŝi pravus. Mi pli kaj pli sentas, ke mi devos akcepti la ideon, ke edzino mankas al mi. Mi devos fari la necesajn aranĝojn por rebonigi tiun mankon. Vi havas edzinon, ĉu ne, Ludoviko?”

„Jes, sinjoro.”

„Ĉu ŝi igis vin feliĉa?”


„Mi feliĉas, sinjoro, sed mi ne dirus, ke ŝi igis min feliĉa. Estus pli ĝuste diri, ke mi igis min feliĉa kun ŝi, kaj ŝi igis sin feliĉa kun mi. Ni estas kontentaj.”

„Vi igis vin feliĉa kun ŝi kaj ŝi kun vi! Diable! Malsimpla diraĵo, sed pensiga. Mi ŝatas ĝin. Mi estas homo, kiu faras ĉion mem — memfarita homo, kiel oni diras — kaj ne plaĉas al mi la ideo, ke mia feliĉo dependu de iu alia, sed se tiel estas... Nu, nu, nu, Ludoviko, via filozofio agas problemsolve. Estas decidite: mi edziĝos.”

(daŭrigo en la sekva numero)

El SF

IVEZIĆ



JES! ESTAS ENUIGE! PRI KIO VI PENSADAS?!

ĈI TIU ENUIGA PATROLADO PENSIGAS MIN.




EKZEMPLE, MI OFTE PENSAS PRI TIO KE ANKAD NI KIUJ HAVAS ĈI TIAN CIVILIZON, NE POVAS KOMPLETE KONTROLI SITUACIOJN, ANTADVIDI OKAZAJOJN KAJ REAGJOJN...



KAJ ĈIAM MI EKSPENSAS KE EKZISTAS IU FORTO KIU KONTROLAS NIN ĈIUN...




NE ŜANĜIGEBLA KAJ NEATINGEBLA DE NI!



OFTE MI EKSPENSAS KE EKZISTAS IU FORTO KIU KONTROLAS NIN ĈIUN... NEATINGEBLA KAJ NEKOMPRENEBLA POR NI!

FUMADO KAJ SANO

Dum en plejmulto de landoj oni bombardas per informoj pri malbonfaraj efikoj de nikotino, en Japanio oni aŭdis antaŭ nelonge el kompetenta loko kontraŭajn opiniojn. Nome, la nova ministro por sano kaj sociaj aferoj de Japanio, Kozo Vatanabe, diris okaze de la transpreno de sia nova funkcio: „La fumado estas bazo de mia bona sano”. Li diris ke dum la antaŭa elektrokampanjo li fumis eĉ 80 cigaredojn tage.



ORO EN KALSONOJ


Londona tribunalo kondamnis kvar virinojn arestitajn pro la provo kontraŭbandi oron el Sudafrika Respubliko. Laŭ la deklaro de la akuzanto John Rogers, la damoj fariĝis suspektindaj pro la marŝmaniero en la stilo de John Wayne. Kvankam ili deklaris ke ili havas nenion por deklari, la doganistoj decidis traesplori ilin. Ili konstatis ke ĉiu el ili portis po ok kilogramojn da ormoneroj kaŝitaj en aparte kudritaj kaj plifortigitaj kalsonoj!

TESTAMENTO

Kion ŝi ne faris dum la vivo de sia edzo, Carlotta Carli el Napolo faros eble post lia morto. Antaŭ nelonge la vidvino Carli here-dis sub unu kondiĉo vilaon kiu apartenis al ŝia edzo: ŝi devas de la fundamento ĝis la plafono kovri ĉiujn murojn de ĉiuj ejoj per speguloj. „Tiel”, klarigis Carli en la testamento sian nekutiman kondiĉon, „ŝi povos ĉiutage de mateno ĝis vespero vidi ke ŝi estas terure dika”. Dum la vivo de sia edzo sinjorino Carli ne multe zorgis pri dieto.

FIKSI LA TURON DE PIZO

Oni ĝis nun faris preskaŭ ĉion por savi la turon en Pizo (Italio), sed vane. Ĝi daŭre ĉiam pli kliniĝadas. La konstruado de tiu ĉi arta konstruaĵo komenciĝis en 1174 kaj daŭris preskaŭ du jarcentojn. La turo altas 54 metrojn, havas fundamenton profunde en la tero je 6 metroj kaj pezas 16 mil tunojn. La muroj estas dikaj 5 metrojn. La kliniĝado komenciĝis praktike jam ekde la komenco de la konstruado, kiam estis finkonstruita la tria etaĝo kaj nuntempe ĝia oblikviĝo jam estas 4,25 metrojn. En la jaro 1965 oni publikigis internacian konkurson por la plej efika solvo kiu stabiligus la turon en la nuna pozicio. Unu el la plej interesaj proponoj estas la ideo planti verdan defendan zonon ĉirkaŭ la turo. Tiucele ĉirkaŭ la turo en Pizo oni plantos arbojn kiuj havas fortan dislarĝigitan radikaron. Post certa tempo la radikoj de tiuj arboj reciproke interplektiĝos kaj kreos certan specon de kradaro. La forfluo de la humideco el la grundo estos pli rapida kio ankaŭ plifirmigos la fundamenton ĉirkaŭ la fama turo.



REKORDA INFORMLABORO

En Zagrebo aperis en aŭgusto kaj septembro 1984 okaze de la 17-a Pupteatra Internacia Festivalo pli ol 70 artikoloj en multekzempleraj gazetoj kiel „Večernji list” (350.000 ekz.), „Arena” (450.000 ekz.), „Studio” (400.000), „Danas” (100.000) kaj aliaj. Oni kalkulas ke entute ĉiuj tiuj artikoloj estis presitaj je ĉirkaŭ 20 milionoj da ekzempleroj. Kvin televidaj elsendoj estis viditaj de pluaj 3-5 milionoj de rigardantoj kaj ĉirkaŭ 100 radio-raportoj aŭditaj de 2-3 milionoj. Ĉar ĉefe pli ol 90 procentoj de la informoj estis distribuitaj en Kroatio, signifas ke ĉiu civitano de Kroatio estis priverŝita de averaĝe 6 informoj pri PIF kaj Esperanto.

ERETOJ

Sciencistoj antaŭvidas ke infanoj naskiĝontaj en la jaro 2000 vivos meze 85 jarojn, kaj infanoj naskiĝontaj en 2030 eĉ 120 jarojn.

En Usono, duono el ĉiuj viroj edziĝas antaŭ la 25-a naskiĝtago, en Eŭropo nur unu kvarono. Fraŭlinoj, utile por scii !!

En antikva Greklando la simbolo por saĝeco ne estis strigo sed serpento.



La fama rakontkolekto „1001 noktoj” ne enhavas 1001 rakontojn sed nur iom pli ol 300.

Iom pri ĝirafoj: ili havas okulojn iom ekstermetitajn kaj povas tre bone okulumi. Do, ili povas vidi antaŭen, malantaŭen, supren, malsupren kaj flanken.

Japanoj faras kolbasojn el fiŝoj. Se vi deziras fari la samon, necesas prizorgi: fiŝviandon, sojon, porkan grason, viandon de baleno kaj diversajn spicojn laŭ via gusto.

Ĉiuj inoj de nia terĝlobo kune pezas same kiel 85% de la viraj loĝantoj.

rebusoj



Ĉu vi ŝatas vojaĝi? Se via respondo estas jesa, bonvolu tralegi tiun ĉi artikolon. En OVO ni intencas aperigadi informojn pri ĉiuspecaj malmultekostaj vojaĝeblecoj en la mondo: adresojn de vojaĝagentejoj kie oni povas ricevi pli detalajn informojn, aŭ aktualajn prezolistojn kiujn ni sukcesis kolekti. Por ke tiu rubriko estu pli utila kun pli da elektoeblecoj, ni petas vin sendi al ni adresojn, katalogojn, tarifojn aŭ aliajn utilajn informojn pri vojaĝeblecoj konataj en via lando.

Nun ni prezentas al vi kelkajn flugeblecojn de vojaĝagentejo: „TRAVEL OVERLAND”, adreso: Barerstrase 73, D-8000 München 40, telefono n-ro (089)2716447. Enirlokoj: Ĉiuj ekflugoj de sur diversaj eŭropaj aerhavenoj, krom FR Germanio. Alveturon tien organizas Travel Overland. La prezoj estas en germanaj markoj.

vojaĝcelo	prezo de unudirekta bileto	prezo de revenbileto
Lagos	950.-	1.695.-
Nairobi	1.050.-	1.750.-
Mexico Ciudad	980.-	1.590.-
Manila	1.040.-	1.890.-
Tokio	1.150.-	2.250.-

RONDVOJAĜO :

Frankfurt – Kairo – Karachi – Bangkok – Manila – Hong Kong –
– Pekino – Karachi – Frankfurt 2.695 GM

INTERNACIA HELPO

Ĉi nokte vi ne povis dormi? Viaj problemoj ŝajnas al vi nesolveblaj? Vi sentas vin tute sola kaj senpova en tiu ĉi vasta mondo? Ne estu pesimisto, levu la kapon! Almenaŭ OVO-redakcio pensas pri vi. Por helpi al vi ni enkondukas la rubrikon „Internacia Helpo”. Tio signifas ke ne nur la redakcio, sed ankaŭ nia legantaro kunhelpas...

Do, ne hezitu peti helpon. Via letero certe ne estos ĵetita en rubaĵujon, ĉar por ni ne ekzistas negravaj problemoj. Iuj estas grandaj, aliaj malgrandaj sed ĉiuj gravaj ...

Ni ne povas certi ke nia redakcio ĉiam povos esti via bona feino, sed ni ne estas la nuraj kiuj ekscios pri viaj problemoj kaj deziroj, kaj iu certe povos trovi solvon... Se vi deziras pro ia kialo resti anonima, ni konsideros vian deziron, kaj ne aperigos vialjn nomon kaj adreson. Sekve, tuj turnu vin al ni!

◆ Mia kvinjara filo ofte malsaniĝas de angino, kaj pro tio kuracistoj postulas ke li konsumu antibiotikojn. Al mi tio ne plaĉas. Mi preferus ian naturan rimedon. Se vi konas ĝin, bonvolu sciigi min pere de „OVO”.

◆ Baldaŭ mi vojaĝos al Suda Ameriko kaj mi preparas mian vojaĝon. Informcele mi tre volonte kontaktus iun kiu antaŭ ne longe faris la samon.

ga, ga...

Ga, ga, vivu geamikoj.

Mi estas ansero – ĉefredaktoro de tiu ĉi rubriko. Mi ricevis ĝin post longa batalo kontraŭ la redaktoroj.

„Ne, ne, ne kaj ne” – kriaciis ili – „Unue ĉar vi malbone parolas Esperanton, due ĉar vi malbone skribas ĝin, trie ĉar vi estas stulta, kvare ĉar vi estas tro babilema, kvine ĉar al vi mankas sento por praktikeco, sese ĉar vi parolas nur pri klaĉoj kaj stultajoj kiuj interesas neniun, sepe ...”

„Jes, jes, jes ...” – akre gakis mi – „Unue, tio ke mi malbone parolas Esperanton ne gravas, malbone parolas centoj el la UK-istoj kiuj jam dum jaroj kunvenas tra la mondo. Due, analfabeta ĵurnalisto ne estas novaĵo en la Movado, tiom da mallertaj verkistoj, instruistoj, ĵurnalistoj vivas en la E-Movado ke oni tute ne rimarkos unu plian ... Trie kaj kvare: ne forgesu ke mi jam dum jaroj tre aktive partoprenas diversajn internaciajn Espe-

ranto-fakkunvenojn, kaj neniu el tieaj fakuloj kaj mondfamaj sciencistoj diris tion al mi. Eĉ kontraŭe, ju pli laŭte mi stultgakis, des pli ili estimis kaj honoris min. Kaj kvine, sen praktikeco Esperanto vivas jam preskaŭ tutan jarcenton, kaj tio ĝenis neniun, kial, diable, ĝuste mi devus esti praktika kaj utila ... Kaj fine, sese: esperantistoj plej ofte vojaĝadas tra la mondo kun la sola celo paroli stultajojn kaj aŭskulti klaĉojn, kaj kial vi pensas ke ili ne ŝatus legi ilin? Ga, ga, ga, ga, ga ...”

Tiel mi finis la paroladon kaj ensaltis en tiun ĉi anguleton. La redaktoroj restis senvortaj, sed tio estas ilia problemo. Mia sola problemo ekde nun estas kolektadi belajn novaĵojn el Esperantujo...

GA
P.S. – Tralegante la tekstojn por tiu ĉi numero de la OVO, iu fakulo deklaris: „Bonega revuo. Jam per la unua numero vi eldonos tri numerojn: provnumeron, unuan kaj la lastan.”

„OVO” – INTERNACIA GAZETO POR DISTRO KAJ AMUZO – Aperas 15-foje jare – ELDONAS: Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. 424 660 – KONSILANTARO: Zlata Cundeković, Ĝorĝe Dragojlović, Gordana Plavšić, Slavko Simunić, Ivica Špoljarec, Spomenka Štimatec – REDAKCIO: Milena Grgić, Jožo Marević, Nikola Rašić, Slavko Simunić (ĉefa kaj respondeca redaktoro), Ivica Špoljarec (grafika kaj teknika aranĝo), Zlatko Tišljar – ADRESO: Kroatia Esperanto-Ligo („OVO”), Amruŝeva 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio – TEL.: 424 660 – PREZO de unu ekzemplero : 3 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 60.-din. – JARABONO: 35 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 700.-din.; validas por 15 numeroj ekde la momento de enpago – PAGU per poŝtpagilo al la adreso de la eldonanto aŭ al la perantoj.

PERANTOJ:

BELGIO: Eldonejo „Sonorilo”, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk.

FRANCIO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris

FR GERMANIO: Esperanto-Centro, Postfako 1450, D-4790 Paderborn

KANADO kaj USONO: Zdravka Metz-Fleury, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québ. H2 2R8

NEDERLANDO: UEA, Nieuwebinnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.

KONKURSO!


SENDU AL NIA REDAKCIO ĈIO KIO ESTAS LIGITA KUN OVOJ KAJ OVUMADO.

Ekzemple: ŝercoj, karikaturaj, fotoj, poemoj, rakontetoj, rebusoj, proverb-oj, receptoj pri ovomangoj ktp., aŭ ion pri la sciencaj esploroj pri ovoj, pri ovo en diversaj lingvoj, pri la rolo de ovoj en la homa historio, pri la specoj de ovoj, do, pri ĉio ajn ligita kun ovo.

Vi povas sendi ion kion vi mem elpensis aŭ verkis, ion kion vi ie vidis, tralegis, pruntis aŭ ŝtelis.

Sur la paĝoj de OVO ni aperigados viajn kontribuojn kaj premios la plej kvalitajn.

Jen nia adreso: Kroatia Esperanto-Ligo („OVO” – konkurso), Amruŝeva 5/1, YU-41000 Zagreb.



(Tiu ĉi karikaturo de Sliva oni ŝtelis de la Teatro Mondovi.)

RAPORTO PRI OVO

(Speciala kontribuo de la „Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto”).

*ovo 1 ŝ Organa korpo, produktata de la inoj de diversaj klasoj de animaloj, k enhavanta germon de estonta samspeca animalo; ~o evoluas jen ekster la patrina korpo (~onaskuloj; birdoj, fiŝoj, insektoj ks), jen en ĝi (viconaskuloj; mamuloj ktp): nefekundita, matura ~o; demeti, elasi ~ojn; la korta koko neniam metas ~ojn²; tio estas ~o de meleagrino!². 2 ŝ Tiu sama korpo, produktata de kokino aŭ aliaj kortobestoj, k uzata kiel nutraĵo: enŝele boligitaj, duonkuiritaj, malmole kuiritaj ~oj; doni ~on, por ricevi bovon² (trompi la ŝanĝanton); pli valoras tuj ~o, ol poste bovo²; sed eble tiu ĉi simpleco de la gramatiko, kiun tiel laŭdas la volapükistoj, estas io simila al la ~o de Kolumbo?² (=io, kio ŝajnas tre simpla, nur post kiam geniulo ĝin eltrovis). ~aĵo. Manganjo farita el ~oj. ~omleto. ~ingo. Malgranda vazo, en kiun oni metas ~on, por ĝin mangi enŝele. ~oida. Havanta la aspekton, formon de ~o: ~oida kapo. ~oido 2. Medikamenta preparajo globoforma aŭ ~oforma, enmetota en la vaginon. ~supozitorio. *~ujo (arkaisme) Ovario. ~ulo. ~onaskulo. ~umi (ntr). Ellasi ~o(j)n: la ~umado de la specio okazas en Majo. *~blanko, ~oblanko². Senkolora, per kuirado blankiganta albumina parto de ~o. ~albumeno. ~oĉelo. Ovolo. ~odukto. Utera tubo aŭ salpingo. ~oflavo. Interna, flava, nutra parto de ~o: ĉiuj ~oflavoj vivigis k elŝovis la kapon². ~oforma. ~oida. ~ogenez. Disvolvigo de ovolo k ~o, k ties studo. el~iĝi. Eliri el la ~o: la cignido nur pene el~iĝis; (f) poemlibroj el~iĝas en konsterna multeco.

FOTO

Ekzistas neimageble multe da homaj vizaĝoj, loglokoj, pejzaĝoj kaj vivsitacioj dise tra la mondo. Neniu el ni, en sia vivo, havos okazon mem vidi ĉiujn ekzistantajn belajn, ĉeesti ĉiujn okazaĵojn kaj renkonti ĉiujn homojn, sed ĉiu el ni posedas la parteton de la tuto. Ni deziras ke, pere de fotoj, en tiu ĉi rubriko ni intersanĝu niajn bildajn posedaĵojn; simple por pli senti la kunestadon kaj por pligrandigi nian konon pri la mondo. Al ĉiu foto kiun vi sendas aldonu mallongan priskribon.



„GEAMIKOJ”

Gordana el Jugoslavio kaj Antonio el Burundio.

Fotis Ivica Špoljarec